



Solecaj infanoj : Ĝuste tiajn homojn bezonas ŝtato de gvatado



Plenkreskuloj ŝatas vidi la senzorgecon, ĝojon kaj vigecon de infanoj. Tamen la disvolviĝo de tiu trajto estas ege minacata de la kontraŭ-Kovid rimedoj. [Legu pli]

De post la komenco de la krizo Kovid-19, politike neproporciaj regularoj influas la tutan socion ; de unu jaro, ili draste ŝanĝis kaj limigis la ĉiutagan vivon kaj kutimojn de homoj, ĉu junaj ĉu maljunaj.

Devigaj maskoj, limigo de kontaktoj kaj de aĉetoj ktp estas akceptataj kredante, ke ili utilas al la situacio kaj ebligas pli rapidan revenon al normala vivo. Tamen tio ankoraŭ ne montriĝis tiel. Plenkreskulo povas kompensi iom da ĝeno dum kelka tempo kaj reguligi sian internan ekvilibron per saĝo kaj rezonado.

Sed kiel juna infano kiu estas en lerno-etapo de socia interagado, povas elteni plenan malpermeson de kontaktoj, eĉ enfermadojn hejme, en iuj landoj ?

Kia rezulto por la infanoj ?

Gerald Hüther, neŭrobiologo, avertas kontraŭ la dramaj konsekvencoj de protektaj Kovid rimedoj por la socia kaj neŭrobiologia* disvolviĝo de la infanoj. Dum unu jaro, ili ekstreme subpremis siajn plej profundajn bezonojn, kiel brakumi siajn geavojn, ludi kun siaj amikoj aŭ ĝui siajn unuajn amikecojn.

- Por sepjara infano, tiu tempo de manko ekivalentas al dek jaroj por sepdekjarulo, diris Hüther.

- Tio ankaŭ kaŭzas ŝanĝojn en la cerbo : Kiam infanoj rezistas al siaj internaj bezonoj dum longa tempo, iam tiu bezono ne plu rimarkeblas.

- Ĝenerale tio validas ankaŭ por la ĝojo esti kun aliaj kaj lerni per ludado. La fermoj de lernejoj kaj la limigo de la kontaktoj senigis ilin de tiu grava kampo de lernado. Sinjoro Hüther bedaŭras, ke dum la pandemio kreskas generacio de junuloj, kiuj ne plu konas la specifan vigecon de infanaĝo. Laŭ li, la disvolviĝo de ilia personeco estas severe malhelpita ; kaj tiuj infanoj fariĝas soluloj. Konsekvence ili ne kapablos konstrui rilatojn kaj senti kompaton. Ĝuste tiajn homojn bezonas ŝtato de gvatado – Ĉu koincide?

* Esplorado de la nerva sistemo per la metodoj de biologio.

de wou/avr

Fontoj:

www.deutschlandfunk.de/neurobiologe-huether-ueber-lockdown-folgen-schule-ist-der.694.de.html?dram:article_id=491369
www.spektrum.de/lexikon/neurowissenschaft/neurobiologie/8520

Ankaŭ tio povus interesi vin:

#Kronaviruso - www.kla.tv/Kronaviruso

#SuferantajInfanoj - infanoj - www.kla.tv/SuferantajInfanoj

#HibridajMilitoj - militoj - www.kla.tv/HibridajMilitoj

Kla.TV – Novaĵoj alternativaj ... liberaj – sendependaj – necenzuritaj ...



- Tio kion la amaskomunikiloj devus ne kaŝi ...
- Tio pri kio oni aŭdas malmulte, de la popolo por la popolo...
- Regulaj informoj ĉe www.kla.tv/eo

Indas resti ĉe ni!

Senpaga abono al nia retpoŝta informilo ĉi tie: www.kla.tv/abo-en

Sekureca Avizo:

Kontraŭaj voĉoj bedaŭrinde estas pli kaj pli cenzuritaj kaj subpremitaj. Tiom longe kiom ni ne orientiĝas laŭ la intereso kaj ideologioj de la gazetara sistemo, ni ĉiam sciu, ke troviĝos pretekstoj por bloki aŭ forigi Kla.TV.

Do enretiĝu ekstere de interreto hodiaŭ! Klaku ĉi tie: www.kla.tv/vernetzung&lang=eo

Licenco:  *Licence Creative Commons kun atribuo*

Oni rajtas distribui kaj uzi nian materialon kun atribuo! Tamen la materialo ne povas esti uzata ekster kunteksto. Sed por institucioj financitaj per la aŭdvida imposto, ĉi tio estas permesita nur kun nia interkonsento. Malobservoj povas kaŭzi procesigon.